

STATUTOJ

Art. 1. — Inter la subskribintoj :

1. F-ino Caroline De Buyser, instruistino, 37, Krijtstraat, Antverpeno; 2. S-ro Edgard De Coster, asekuristo, 170, Kerkstraat, Antverpeno; 3. S-ro Antoine De Hondt, komerc-oficisto, 29, Beerschotstraat, Antverpeno; 4. S-ro Morris De Ketelaere, komercisto, 50, Lamorinièrestreet, Antverpeno; 5. S-ro Maurice Jaumotte, ĵurnalisto, 254-14, Lage Weg, Hoboken; 6. F-ino Jeanne Morrens, komercoficistino, 3, Happaertstraat, Antverpeno; 7. S-ro Frans Schoofs, societsekretario, 11, Kleine Hondstraat, Antverpeno; 8. S-ro Charles Van der Veken, librotenisto, 48, Antwerpsche steenweg, Oude God; 9. S-ro Jozef Van Gulck, bankoficisto, 314, lange Leemstraat, Antverpeno; 10. S-ro Oscar Van Schoor, apotekisto, 20, Vondelstraat, Antverpeno; 11. S-ro Nicolas Van Winge, librotenisto, 4, Mechelsche Plein, Antverpeno; 12. S-ro Gustave Vermandere, komercisto, 18, Vlemineckxstraat, Antverpeno; 13. S-ro Vermuyten, oficisto de la urba administracio, 53, Gretrystraat, Antverpeno.

Kaj ĉiuj, kiuj estos poste allasataj en la societo, estas fondita koopera societo, kiu portas la nomon : « Belga Esperanto - Instituto ».

Art. 2. — Ĝia sidejo estas en Antverpeno.

Art. 3. — Ĝi celas ĉu por propra konto, ĉu por konto de kaj kun aliuloj, iniciati kaj trakti librokomercajn aferojn, ekzerci la negocon de presisto-eldonisto, tiun de reklam- kaj abonageto por gazetoj, ĉio precipe kun rilato al la lingvo Esperanto, la makleradon inter Esperantistoj reciproke aŭ inter Esperantistoj kaj aliuloj, kaj la organizon de ĉio, kio povas utili, aŭ rilatas al la propagando de la lingvo Esperanto.

Ĝi povas per mon-enmeto, transskribo, subskribo, kunfandiĝo aŭ kiol ajn, partopreni en ĉiuj entreprenoj, kiuj povas utili al la plenumado de ĝia negoco.

Art. 4. — La societo estas fondita por tempospaco de tridek jaroj, komenciganta hodiaŭ. Tiu tempospaco povos esti sinsekve plilongigata aŭ la societo povos esti antaŭtempe disigata, post decido de la ĝenerala kunveno, laŭ la maniero priskribita por ŝanĝoj de la statutoj. Ĝi povos subskribi interkonsentojn, kun validectempo, kiu superas ĝian daŭrperiodon.

Art. 5. — La societa kapitalo konsistas el akcioj de po cent frankoj, en nelimitita kvanto, je nomo, nedivideblaj, nur cedebaj inter akciuloj post konsento de la administrantaro. La minimuma sumo, difinita je dekdumil kvincent frankoj estas kunmetita de la fondintoj de la societo kiuj subskribis cent du dek kvin akciojn kaj pagis la sumon de du mil kvincent frankoj.

Art. 6. — La nombro de akcioj de ĉiu societano estas ne limigita, tamen la administrantaro havas la rajton difini maksimuman nombron, kiu ne povas esti superata. Por ĉiu subskribita akcio estas tuj pagata kvinono de ĝia sumo. La administrantaro alvokas la monon, kiam ĝi opinias tion necesa; ĝi difinas la sumon kaj la datojn de la pago. La societanoj estos pri tio informataj unu monaton antaŭe.

Neniel tamen la administrantaro povos alvoki en la daŭro de unu societa jaro, pli ol 10 % de la subskribita kapitalo.

La administrantaro rajtas, post forpaso de 6 monatoj, de la tago de l'monalvoko, deklari senvaloraj tiujn akciojn, por kiuj ne okazis la alpago.

Plifruaj alpagoj povas nur okazi kun la konsento de la administrantaro kaj laŭ la kondiĉoj de ĝi difinitaj.

Art. 7. — Krom tio estas kreitaj tri cent fondint-akcioj sen indiko de valoro, kiuj havas la samajn rajtojn, inkluzive la voĉdonrajton, kiel la societaj akcioj kaj rajtas al parto de la profito, laŭ artikoloj 22 kaj 23. Ili estas je nomo kaj nur cedebaj inter societanoj post konsento de la administrantaro.

La nombro de fondint-akcioj, kaj la avantaĝoj ligitaj al ili, ne povas esti ŝanĝataj eĉ ne per ŝanĝoj en la statutoj.

Por ĉiu akcio subskribita je la fondo, estas donataj al ĝia posedanto du fondint-akcioj. La kvindek restantaj fondint-akcioj estas cedotaj al la kvindek sekvantaj subskribintoj, po unu akcio por subskribo de minimume mil frankoj.

La fondint-akcioj estas komprenataj sub la ĝenerala titolo de akcioj.

Art. 8. — La societo havas limigitan respondecon; ĝi estas responsa nur ĝis la sumo de sia societa havaĵo. La societanoj estas ligitaj nur aparte, neniu solidara ligaĵo ekzistas inter ili. Ĉiu estas nur responsa ĝis la sumo de la akcioj de li subskribitaj.

Art. 9. — La administrantaro decidas pri la akcepto kaj la eksigo de societanoj kaj pri la redono de la pagoj de elirantaj membroj.

Art. 10. — La societo estas administrata de administrantaro konsistanta el minimume kvin kaj maksimume naŭ administrantoj, nomitaj por ses jaroj de la ĝenerala kunveno de societanoj kaj ĉiutempe eksigeblaj de tiu ĝenerala kunveno.

Art. 11. — La administrantaro elektas en sia mezo unu prezidanton kaj unu sekretarion. La administrantaro ne povas valide pridiskuti se ne ĉeestas aŭ estas reprezentataj almenaŭ la plimulto de ĝiaj membroj. Je egaleco de voĉoj, decidas la voĉo de tiu, kiu prezidas la kunsidon de la administrantaro.

Art. 12. — La administrantaro povas doni al unu aŭ pli el siaj membroj, la titolon de administranto-delegito; ĉiu el la administrantoj havas la povon speciale donitan al li de la administrantaro.

Art. 13. — La administrantaro havas la plej vastan povon por plenumi ĉiujn agojn de administrado aŭ de organizo, kiuj interesas la societon. De ĝia kompetenteco estas ĉiuj agoj, kiuj ne formale estas rezervitaj laŭleĝe al la ĝenerala kunveno.

Art. 14. — Ĉiuj aktoj, kiuj ligas la societon, devas, escepte en okazo de speciala deleĝo laŭ decido de la administrantaro esti subskribataj de du administrantoj. La korespondado kaj ĉiuj aliaj aktoj de la ĉiutaga direktado estos subskribataj de unu administranto. Se temas pri dokumentoj kaj kvitancoj por poŝto, fervojo, telegrafo, telefono, transportservoj kaj dogano, la administrantaro povos nomi rajtigiton.

Art. 15. — La kontrolo pri la societo estas konfidata al aro de minimume du kaj maksimume ok komisaroj, nomataj de la ĝenerala kunveno por 6 jaroj kaj ĉiutempe eksigeblaj de tiu ĝenerala kunveno.

Art. 16. — Por la regula plenumo de sia funkcio, devas garantidoni, ĉiu administranto kvin akciojn, ĉiu komisararo du akciojn.

Art. 17. — La administrantoj kaj komisararoj havas, rilate al sia funkcio, nenium personan devigon. Ili estas nur respondaj pri la plenumo de sia mandato.

Art. 18. — La ĉiujara ĝenerala kunveno okazas laŭstatute, la unuan dimanĉon de la monato Majo, je invito de la administrantaro, unuafoje en Majo de mil naŭcent dudek sep. La invitoj al la ĝenerala kunveno povas okazi per ordinara letero.

Plie estos publikigataj en la monata gazeto « Belga Esperantisto », ĉiuj komunikoj ne postulataj de la leĝo, sed kiuj povas interesi la akciulojn.

Art. 19. — La kunveno estas prezidata de la prezidanto de la administrantaro aŭ de la administranto kiu lin anstataŭas.

Art. 20. — Se temas pri ŝanĝoj en la statutoj, la ĝenerala kunveno povas valide decidi, nur kiam tiuj, kiuj ĉeestas la kunvenon, posedas almenaŭ la du trionojn de la akcioj.

Art. 21. — Je la tridekunua de Marto de ĉiu jaro kaj unuafoje je la tridek unua de Marto mil naŭ cent dudek sep estos fermataj la kontoj de la societo kaj estos farataj de la administrantaro, inventaro kaj la bilanco kaj konto de profitoj kaj perdoj, konforme al la leĝo.

Art. 22. — La profita saldo de la bilanco, post depreno de ĝeneralaĵ elspezoj, societaj ŝarĝoj kaj amortizoj de almenaŭ 2 % sur la nemoveblaj posedaĵoj kaj 15 % sur la aliaj havaĵoj, estas la neta profito.

De tiu ĉi profito estas antaŭe deprenataj : 1) 5 % por la laŭleĝa rezervo. Tiu ĉi depreno ĉesos esti deviga tuj kiam la rezervo atingos unu dekonon de la societa kapitalo; 2) la sumo necesa por pagi 5 % al la alvokita parto de la akcioj.

De la saldo estos dediĉata 20 % al la administrantaro kaj al la komisararo; la dividido okazos laŭ interkonsento reciproka, tiamaniere ke la parto de komisararo ne superu la duonon de tiu de administranto.

La tiam restanta saldo estos fine dividata jene : 1) 25 % al la fondintakcioj; 2) 25 % al la akciuloj; 3) 25 % al eksterordinara rezervo; 4) 25 % al « Belga Ligo Esperantista », kiu povas ĝin uzi por propagandaj celoj, pri kiuj decidis nerevokoble la Estraro de tiu Ligo.

Art. 23. — Eventualaj perdoj, post elĉerpo de la rezervoj kaj de ĉiuj aliaj rimedoj, estos pagataj de la akciuloj laŭ proporcio de ilia partopreno.

Intertempaj aranĝoj.

La nombro de administrantoj estas de la hodiaŭa ĝenerala kunveno fiksita unuafoje je 6, kaj la nombro de komisararoj, je 5. Estas nomataj per unuanima voĉdono por daŭro de ses jaroj, kiu finiĝas tuj post la ĝenerala kunveno de 1932 :

A. Administrantoj : S-roj Edgard De Coster, Morris De Ketelaere, Maurice Jaumotte, Frans Schoofs, Oscar Van Schoor kaj Gustave Vermandere.

B. Gekomisararoj : F-ino Caroline De Buyser, S-ro Antoine De Hondt, F-ino Jeanne Morrens, S-roj Charles Van der Veken, kaj Hector Vermuyten.

Ĉiuj suprecititaj, kiuj akceptas.

Farita duekzemplere en Antverpeno, la 1an de Marto 1926a.

(subs.) Maurice Jaumotte, Frans Schoofs, Edgard De Coster, Oscar Van Schoor, Jozef Van Gulck, Caroline De Buyser, Hector Vermuyten, Gustave Vermandere, Antoine De Hondt, Morris De Ketelaere, Charles Van der Veken, Jeanne Morrens, Nicolas Van Winge.

Registrita en Antverpeno (Admin. kaj Private subskribitaj aktoj), la 5an de Marto 1926, vol. 75, folio 32, fako 16, tri folioj kaj unu signeto, ricevis frankojn 150. La registristo (subskr.) J. VAN DEN BERGHE.

Deponita en la Komerca Juĝoregistro de Antverpeno, la 5an de Marto 1926.